

## Esperanto por lernejoj klasoj

kuriozaĵo.

*Puzlo* pri kalkulado

### Matematikaj artifikoj

Kontribuaĵo de Gilberto Bezerra, ekslernanto

**1** Ĉu vi kapablas kalkuli 29 oble 31 kape, *tuj tuj*?

Uzante algebran lertaĵon, oni faras tion tre facile.

Jen la solvo de ĉi tiu multiplikado:

$$29 \times 31 = (30-1) \times (30+1) = 30^2 - 1^2 = 900 - 1 = 899.$$

Jen alia problemo:  $48 \times 52$ .

$$48 \times 52 = (50-2) \times (50+2) = 50^2 - 2^2 = 2500 - 4 = 2496.$$

**2** Lernu alian artifikon:

Por kvadratigi numeron finantan per 5, oni faru tion:

a) apartigu la numeron 5, pro tio ke oni jam scias ĝian kvadraton (25).

b) Multobligu la restantan numeron per sia sinsekva numero kaj **apudmetu** 25 dekstre de tiu rezulto.

$$\text{Ek: } 35^2 = 3 \times 4 = 12 \text{ sekvata je } 25 = 1225.$$

Uzu tiujn artifikojn por kalkuli:

a)  $24 \times 26$  .....

b)  $95 \times 105$  .....

c)  $47 \times 53$  .....

ĉ)  $95^2$  .....

d)  $25^2$  .....